

# LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. —Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

## PRAHA, LA XIII. KONGRESURBO.

(Skizo historia.)

Jam en la epoko, kiam Praha estis nura kastelo, turnis sin al ĝi la okuloj de la tuta nacio bohema. Ĝi estis politika centro de la lando kaj sidejo de la princoj, post kiam unuiĝis ĉiuj gentoj bohemaj. Tie estis konstruitaj la unuaj sanktejoj kristanaj kaj tie ripozas la korpo de sankta princo Václav, unu el la unuaj kristanaj princoj, kiu ĝis nun estas festata kiel patrono de Bohemio.\*)

Evoluo de Praha respondas al la signifo, kiun ĝi havis por la tuta nacio. Tie devenis grava fojrejo, kiu allogadis komercistojn el malproksimaj regionoj, kaj gravaj vojoj koncentriĝantaj en Praha faris el ĝi eminentan punkton komercan. Jam en la epoko, kiam princoj regis la landon, Praha etendiĝis sur ambaŭ bordoj de Vltava (Moldavo) kaj tie estis lokumita sidejo de riĉaj komercistoj germanaj kaj romanaj. Sed ĉefa signifo de Praha datiĝas de post la fondiĝo de kvartalo »Staré Město« (Malnova Urbo) komence de la regado de reĝo Václav I. (en 1236.) al kiu en la tempo de Přemysl II. (en 1257.) aliĝis »Menší Město« sur la maldekstra bordo, kaj poste, dum la brila regado de Karlo IV., la patro de la patrujo, kiel lin nomas bohemaj historiistoj, »Nové Město« (Nova urbo) (en 1348.). Ĉiu el tiuj kvartaloj havis propran aŭtonomion kaj estis submetita senpere al la reĝo.

En tempo de Karlo IV. la nove konstruita kastelo de Praha, kies orumitaj tegmentoj brilis en malproksimon kaj kie post

fondo de ĉefepiskopejo kreskis la gotikaj kolonoj de la katedralo de sankta Vít (latine: Vitus), estis centro ne nur de la ŝtato bohema, sed eĉ de la granda regno Roma. Per fondo de la universitato (en 1348.) akiris Praha kulturen gravecon por la tuta Mezeŭropo kaj tiam ĝi povis vetkuri kun plej gloraj mondurboj eĉ kun Parizo kaj la »eterna urbo« Romo.

Kiam la putranta epoko de la roma eklezio komencis vastigi la venenon de malmoraleco, ĝi trovis en Praha en persono de Hus la plej energian kontraŭbatalanton. Li sciis kunigi la reformajn pensojn de diverslandaj reformistoj kaj prediki ilin al la bohema publiko, antaŭe en preĝejo de sankta Miĥaelo kaj poste en kapelo de Betlehem. Kaj post la tragedia morto de Hus Praha fariĝis centro de la Hus-ana movado. Tie estis formita la unua militistaro bohema kontraŭ la papaj krucmilitistoj kaj antaŭ ĝiaj muroj okazis la unuaj bataloj por bohemoj venke finitaj.

Kaj kiam la nove elektita reĝo Ferdinand I. el familio de Habsburgoj (1526) komencis subpremi la protestantan spiriton de la nacio, en Praha (en j. 1547) aŭdiĝis potenca protesto, kiu tamen estis subpremita de la reĝo. La jaro 1547 estis antaŭsigno de tio, kio okazis en 1618. La senĉesa subpremado de la protestantismo kaŭzis en la lando ĝeneralan malkontenton. Tial oni ne povas miri, ke la elfenestrigo de la imperiestraj landestroj (23. majon 1618) estis signo de ĝenerala ribelo per kiu la bohemoj volis defendi siajn naciajn kaj religiajn rajtojn. Kaj Praha, kiu neniam perfidis sian tradicion de la nacia gvidanto, prenis rekompencan por siaj »pekoj« el la manoj de venĝema Habsburgo: Sur la Malnovurba placo, antaŭ la magistrata

\*) Bohema princo Václav estis mortigita en Boleslav la 28. sept. 935. Laŭ katolika kalendaro estas lia nomo festata 28. sept.

domo kontraŭ la preĝejo de Týn estis konstruita granda ekzekutejo, sur kiu finis sian vivon la 21. junion 1620 27 sinjoroj, inter ili 12 burĝoj de Praha.

Kaj sekvis tempo tre malgaja: la prot-estanta loĝantaro devis formigri el la lando. Venis fremduloj katolikaj. Ne estas pli tragika okazintaĵo en historio de Praha ol tiu, ke en 1648 ĉiuj loĝantoj de Praha, eĉ tiuj, kiuj antaŭ nelonge estis »herezuloj kaj ribelantoj« defendis la urbon kontraŭ prot-estantaj svedoj, dume aroj da bohemiaj elmigrintoj mortadis en fremda maro, konservante en sia animo la bildon de sia amata hejmurbo.

Praha vivis en forgeso. Ŝajnis, ke ĝi tute perdos sian iaman signifon de la landa ĉefurbo kaj estos tute perdita por sia nacio kaŭze de la centralisma kaj germaniga peno de Josef II., kiu malestimante la estintecon de la nacio, volis el la reĝa kastelo fari kazernon. Sed ĵus en tiu tempo ekbrilis la unua lumo: sciencistoj kaj racionalistoj pro amo al la nacio komencis studi ĝian historion, ĝian lingvon jam preskaŭ mortan kaj ĝiajn memoraĵojn. La afero de la nacio ŝajnis al ili tiom malesperiga ke ili ne kredis, ke estas ebla la savo. Ili volis konservi nur ĝian historion. Sed la historiaj kaj lingvaj studoj de la sciencistoj, kiuj skribis siajn verkojn germane kaj la-

tine, vekis sopirojn de kelkaj hazardaj patriotoj, revivigi la nacion. Kaj denove Praha ludis tie eksterordinaran rolon. Ne nur pro tio, ke ĝiaj bibliotekoj kaj arĥivoj donis al la vekantoj Dobrovský, Dobner kaj Pelcl fundamenton por iliaj studoj, sed eĉ tial ke en ĝi devenis la komencoj de la nova bohema literaturo, teatro kaj poezio kaj ke ĝia metiistaro kaj burĝaro la unua estis gajnita por la afero de la nacio. Kaj kiam helpe al la bohema renaskiĝo alvenis en la komenco de la XIX. jarcento la tiamonda movado kultura, Praha pro sia historio, estimindaj preĝejoj, songemaj palacoj kaj la admirinda silueto de la reĝa kastelo Hradčany ekparolis al la sentemaj koroj de romantikuloj. Forpasis ne tute 50 jaroj kaj Praha fariĝis denove kapo kaj gvidanto ne sole de Bohemio, sed de la tuta bohema nacio.

Praha fariĝis centro de spirita vivo bohema. Tie Palacký konstruante en la Nacia Muzeo la centron de bohema scienco, skribis la admirindan verkon »Historio de nacio bohema«, tie naskiĝis la bohema arto kaj tie post la fino de la nacia renaskiĝo devenis eĉ la renaskiĝo politika kiun fondis Karel Havlíček.

Eĉ en la tempo de la mondmilito kaj de la nova subpremo kiun trairis la bohema nacio, Praha gvidis la nacion. Ĝi restis

## FELIETONO

B. TITL:

### MEMOROJ EL LA DUMMILITA TEMPO.

(Daŭrigo.)

La mondmilito kaj la rolo kiun ni, bohemoj, ludis en ĝi estis por ni dolora de du vidpunktoj: ni devis batali, por la familio de Habsburgoj, kiu nian nacion neniam amis, kaj kiu kaŭzis preskaŭ tutan ekstermon de nia nacio kaj lingvo — ni devis batali kontraŭ niaj amikoj. Por ni ne estis eble ne deziri malvenkon al la centraj potencoj kaj tial ni kondukis tute pasive. Habsburgoj sentis tiun pasivecon kaj laŭ tio ili nin traktis. Oni spionis nin en ĉiu movo kaj malliberejoj estis plenaj de niaj homoj. Ni sentis, ke la venko de Habsburgoj estos por ni pli terura ol nia malvenko sur Bílá Hora (Blanka Monto) en 1620. Simplaj du vortoj »1915 deutsch!« kiun en la fino de 1914 skribis iu fidela aŭstriano sur la pilastron de nia urba (bohema) teatro memorigis pri la stato de nia estonta situacio.

Tial la militaj raportoj estis de ni legataj kun avido. Se ili estis favoraj por la centraj potencoj, tiam en nia urbo ĝojis la hebreoj, kiuj preskaŭ ĝenerale sin prezentis kiel habsburgaj germanoj. En okazo de malo ĝojis ni. Por ni ne estis necese legi la oficialajn raportojn, sufiĉis nur observi ilian abundecon en la gazetoj. Se ili estis longaj, tiam la milita feliĉo klinis sin al la centraj potencoj. Se la milita stato estis menciata nur per kelkaj vortoj, tiam la situacio estis por ili malfavora. Kaj en tia tempo ni mem penis sciigi la detalaĵojn.

Nia longa Ŝnábl estis speciale kapabla elsentia la veran staton de la situacio. — Ĉiutage li tralegis la ĉefajn gazetojn. Sufiĉis trovi nur kelkajn aludojn jen kaj tie, kaj lia fantazio kombinis rapide la veran staton de la lastaj okazintaĵoj sur la batal-kampo. Tial ni ĉiam avide atendis lian alvenon en la kafejon.

Tamen en la kafejo ni ne estis certaj antaŭ la spionoj kaj tial Ŝnábl prezentis

forta kaj fiera portanto de la kredo kaj de la rezisto, kaj ĝin sekvis ĉiuj urboj bohemaj. Nun ĝi estas kapo de la libera ŝtato, kiu per sia propra laboro kaj propra kulturo penas ludi honestan rolon inter demokratiaj nacioj.

Kaj tie en la unua semajno de aŭgusto kunvenos la tutmonda esperantistaro por manifestacii la tutmondan fratecon. Praha ĝoje etendas la brakojn al la gastoj, Praha invitas...

## LA LANDO DE NIA XIII. KONGRESO.

(Ekonomia skizo.)

La Respubliko Ĉeĥoslovaka, natura centro, tiel dire koro de Eŭropo ne sole laŭ vidpunkto de fervoja kaj rivera transportoj sed ankaŭ pro siaj gravecoj ekonomia kaj politika devas esti komparata al Belgio rilate la abundan riĉecon de sia tero kaj minoj kaj rilate la forton, kiun havigas al ĉiu lando ĝia plena profitigo.

Jen konstato, kiu evidentiĝas post trastudo de statistika materialo; jen faktoj, kiuj baziĝas sur la viviga laboremo ŝuldata al la morala forto de la ĉeĥoslovaka nacio, sur ĝia progresema aktiveco kaj kurajo.

sian raporton nur dumvoje al niaj hejmoj. Kiam ni eliris el la kafejo sur la straton kaj ni konvikiĝis ke nenio suspekta estas en la ĉirkaŭaĵo, tiam Zikan diradis: »Tak Šnábl spust!« (Do, Šnábl komencu!). Kaj amiko Šnábl sciis bone nin konsoli...

Kvankam miloj kaj miloj da niaj samnacionoj mortadis sur batalkampo batalante por la monarkio, ni kaj ĝenerale la tuta nacio deziris la venkon al la ententaj ŝtatoj. Kaj tiu deziro estis kunigita kun forta kredo, ke tiel okazos. Tamen en nia rondo estis du pesimistoj: Zikan kaj Kreĉmer. Per sia konstanta pesimismo ili venenis multajn momentojn ĉefe al sinjoroj Šnábl kaj kapelestro Horák, kiuj ĉiam tre koleris trovante malaprobos de sia optimismo.

Zikan kaj Kreĉmer estis de ni juĝataj kiel »aŭstriakoj« kaj multfoje oni promesis al ili pendigon sur la strata lanterno, post kiam nia lando estos sendependa. Tamen mi devas diri, ke tio ankoraŭ ne okazis kaj ke ili vivas.

(Daŭrigota.)

Tiel klariĝas, ke en la antikva Aŭstrio 42 km de vojoj korespondis al 100 km kvadrataj, kontraŭ 69 km en la Respubl. Ĉeĥoslovaka. En relativa komparo al Eŭropo ĝia fervojo (13.400 km) metas la Respublikon sur la kvaran lokon, ĝia nombro de poŝtaj oficejoj (5000 kun 45.000 personoj) sur la trian, kaj la longeco de telefonaj-telegrafaj linioj (kun senfadenaj stacioj) sur la kvaran lokon.

Ĝi okupas la unuan (superante per 50% Germanion) en la sukerindustrio, produktante sur ĉiu hektaro 1270 kg (kontraŭ 658 kg en Germanio). De la sama surfaco la Respubliko gajnas 1.3 hl. de alkoholo [Germanio 1 hl.).

La Ĉeĥoslovaka Respubliko viciĝas en la ĝenerala produktado preskaŭ en ĉiu branĉo apud la grandaj ŝtatoj, kvankam, rilate la areon, ĝi estas la dekdua inter ili. En la tutmonda sukerindustrio ĝi liveras 7% (de la tuta kvanto de sukero el beto kaj kano), 15% (de la beta). Graveco de ĝia agrikulturo evidentiĝas pli klare ankoraŭ, kiam oni komparas la diagramojn indikantajn la produktadon rilate al ĉiu loĝanto. Laŭ tiu vidpunkto ĝi okupas pli bonan lokon, ol estas tiu, sur kiun la nombro de loĝantoj ĝin starigas (la oka). Multaj produktoj ne sole sufiĉas por la enlanda bezono, sed povas esti eĉ eksportataj (hordeo, terpomoj, fruktoj, aveno, lupulo, ligno, sukero, alkoholo, biero, malto.)

La sumo de importoj kaj eksportoj de la ĉeĥoslovaka industrio (imp.: 1.012 milionoj da Kronoj ĉs., kontraŭ eksp.: 2.697 milionoj da K. ĉs.) preskaŭ egalas la statistikon belgan. Sole Usono, Francio, Rusio kaj Britio havis eksporton pli grandan, ol importon, Eksporto de la Respubliko estis pli granda ol la tuta eksporto de la antikva monarkio Aŭstrio-Hungaria, kies ceteraj landoj ĝin formitaj estis ĝiaj ĉefaj klientoj.

La arbaroj, okupantaj 32% de la Respubliko (pli ol 4 milionoj da ha), estas riĉa fonto de enspezoj, vicigante la respublikon sur la sesan lokon inter la plej riĉaj ŝtatoj.

Tutmonda famo akompanas la vitroindustrion, kies produktoj estas bone konataj sub la nomo »bohema vitro«.

Porcelano, fajenco, ĥemia industrio, leda industrio same kiel tiu de metaloj, de agrikulturo, ligno, nutraĵoj, la teksa kaj de

la agrikulturaj maŝinoj, unu ŝuperas la alian en la evoluo, helpataj per financa organizaĵo, kies kelkaj bankoj apartenas inter la plej gravajn en la mondo.

Multe da produktoj, kiujn la mondo konis antaŭ la milito sub la nomo »Made in Austria«, devenas el la Respubliko

La hispana ambasadoro en Praha, S-ro Pedro Sebastián de Erice, kiu juĝas la internacian rolon de la Respubliko Ĉeĥoslovaka laŭ propraj spertoj, diras, ke li havas blindan fidon je ĝia ekonomia estonteco. »La ĉeĥa nacio estas tre laborema kaj krom tio posedas tre prosperantan industrion, kiu reprezentas 80% de la industrio ekzistinta en la eksmonarkio Austria-Hungara. Al tio oni devas aldoni la riĉecon de la lando, en kiu estas multe da arbaroj, cerealoj kaj sukero, kiu estas la ĉefa riĉaĵo de la loĝantaro, ĉar la eksportado de sukero, la »blanka oro« de Ĉeĥoslovakio, plej multe helpas la pliboniĝon de la monkurzo.

La subtero estas ankaŭ tre riĉa, entente multenombrajn karbominejojn kaj se al ĉio ni aldonas la privilegiitan situacion geografian en la Centra Eŭropo, ĝiajn mirindajn komunikaĵojn per fervojoj kaj riveroj (Vltava kaj Elbo) kaj la konvencion, laŭ kiu la havenoj en Hamburg kaj Triest povas esti uzataj de tiu ĉi ŝtato por ke ĝi eksportu sian riĉaĵon, vi facile komprenos mian optimismon, se mi kredas, ke la valoro de la mono (1 peseto = proksimume 11 kronoj) en nelonga tempo povos pliboniĝi, kaj se mi krom tio esperas, ke la komercaj rilatoj inter Hispanio kaj Ĉeĥoslovakio fariĝados ĉiam pli intensaj.«

E. K. — Praha.

## LITERATURO

### LA FINO.

(Fino).

Multefoje, dume Anita servis al la onklo, mi trarigardis la bildojn. Ili estis la verkoj de maljunaj holandaj majstroj, nigriĝintaj kaj malserenaj — kaj estis inter ili eĉ diversaj fotografaĵoj de regimentestro. La vicoj da junaj soldatoj, amasoj da oficiroj; sur multe da portretoj Milano Klen, bela kvindekjarulo, kun severaj okuloj, rektiĝinta sur ĉevalo... Ekinteresis min unu bildo; Milano Klen kun eltirita sablo, alte etendita la kapon direktigitan al la vicoj

de defilantaj regimentoj. La uniformoj brilas sur la suno, la rimeno de ĉevaloj brilas... La bildo kvazaŭ reviviĝis! Regimento de Klen defilas. Armilo eltirita, la manoj streĉitaj, aĉ la piedoj kiel la kordetoj — ŝajnas, ke la paŝoj estas aŭdataj — la bruo de l'tamburoj — kaj ree unu vico, unu paŝo, unu tiro... Ĉiuj okuloj celas tien, kie sur la ĉevalo rekte sidas regimentestro Milano Klen; lia rigardo trapikas, ĝis la koro al homo en la korpo falruiniĝas, se li estas unu el tiuj defilantaj soldatoj.

Milano Klen, regimentestro...! —

El malantaŭa ĉambro laŭtigis sufokiga tuso. Anita alvenis, kaj venigis onklon. Li okulvadis je dislokitaj objektoj, sed li perceptis nenion; sed tamen: el unu muro ekbrilis du nudigitaj, krucmetitaj sabloj — kaj jen kvazaŭ ia hela momento ekbrilis tra la kapo de Milano Klen, li iom ekridis. Poste li lasis sin gvidi per Anita al la tablo, li sidigis. Kaj jam denove liaj okuloj estingiĝis. La floroj sur la fenestro ekinteresis lin, li etendis la manon, eble li volis iam forŝiri. Sed Anita lian manon fortiris.

Ŝi starigis ladan poteton da kafo antaŭ lin, blankan buŝtukon kunliginte sub la mentono. Milano Klen postameze manĝis.

Mi rigardis lin kun muta intereso. Li do estis tiu homo, kiu per sia temperamento ĉiujn malhelpojn sciis forigi, disrompi, tiel multajn rektigitajn nukojn piedpremi — la homo, kies rigardo fasciniis, frostigis eĉ bruligis, piskis kaj instruis la fieron...

Ne, li ne estis jam tiu homo! Kaduka ruĝo de l'maso da krakantaj ostoj. Klinita kapo kaj la okuloj senvivaj, idiote konfuzitaj. Malgaja malvenko! Vivbilanco kun terura pasiveco — kaj per nenio, nenio jam estas eble pagi!

Mi rememoras unu malgrandan okazon. Anita postameze alportadis cigaredan tabakon, tubpaperojn kaj pretigis la cigaredojn. Ŝi pasie fumis. Por trankviligo de la nervoj — ŝi diris, sed mi pensas, ke tio estis al ŝia domaĝo. Unufoje ŝi prenis freŝe kunrulitan cigaredon, bruligis ĝin mem kaj ellasis la fumon per malfermita buŝo — kaj poste ŝi proponis ĝin al regimentestro. »Tamen almenaŭ tion...« Ŝi diris. Ŝajnis al mi, kvazaŭ ŝi volus vekti iom da vireco en lia renversita korpo, paralizi la impreson de malgaja malvenko. »Kaj sonis al mi eble nenia frazo tiel terure tragedie, kiel ĉi tri mallongaj vortoj eldiritaj de Anita »Tamen almenaŭ tion.« Regimentestro ak-

ceptis la cigaredon seninterese: Eklevis ĝin al la buŝo, sed inter la lipoj li ne sukcesis ĝin teni, la cigaredo falis. Kaj samtempe la atako de konvulsio skuigis lian korpon. Li larĝe malfermis okulojn kaj el la buŝo salivofluis.

Anita helpis al li; per la tuko ŝi viŝis la buŝon kaj altiris lin en la angulon de apogseĝo, ke la korpo ne falu teren. La silento ekregis en la ĉambro, la ombroj grimpis el anguloj denove ĉion peziginte. El unu muro brilis la nudigita ŝtalo de krucmetitaj sabroj. Ili estis el la tempo de regimentestra gloro.

Antaŭ nelonge do mi ricevis la sciigon kun larĝa nigra rando: »Post longtempa malsano...« La adreso de la sciigo estis skribita per eta belaspekta skribo, ĝi estis la skribo de Anita. Tiel mi rememoris denove regimentestron Milano Klen kaj lian nevinon Anita. Kaj tamen mi ne povis decidi min, ke mi sidiĝu kaj skribu al Anita: »Akceptu mian sinceran kondolencon je Via doloro pri la perdo...«

Ne!

Anita enterigis l'onklon — sian junecon ŝi enterigis jam pli frue!

El ĉeĥa originalo de Jos. Civr.  
Trad.: Zdena Kubíková.

## ESPERANTISMO

### ZORGU PRI LA BELSONECO!

(Al la problemo —ujo aŭ —io.)

Jam de pratempo estas la pensoj de la homo altirataj de la Belo, kaj proksimiĝi al la Belo estas la ĝenerala devizo de la nova epoko. Ni ŝatas ĉion, kio plaĉas al nia okulo: konstruaĵojn aŭ alian verkon homan, ni admiras belajn verkojn de la naturo, sed ni admiras ankaŭ ĉion, kio estas agrabla al nia orelo: muzikon, kanton kaj eĉ parolon... Tiu, kiu konstruas aŭ verkas, devas ĉiam peni por atingi la plej altan gradon de l'beleco. La poeto aŭ verkisto kiu esprimas iun ideon, se li volas trovi sukceson en la vasta publiko, devas ne nur elekti belan formon stilan, sed eviti ankaŭ vortojn aŭ frazojn, kiuj sonas malagrabla. Laŭ la sama principo direktas sian parolon ankaŭ la oratoro. Ni volonte aŭskultas oratoron, kies parolo estas bone akcentata, kiu parolas flue, ne balbutas, simple tiun, kiu scias sian parol-

on vesti per bela formo kaj ĝin prezenti tiel, ke ĝi estas agrabla al la orelo.

Kaj de tiu principo devas esti gvidata ankaŭ ĉiu esperantisto, speciale tiu, kiu verkas aŭ propagandas. Por ni estas necese ne nur ami la lingvon de Zamenhof, koni kaj valorigi tion, per kio ĝi superas la lingvojn aliajn, sed ankaŭ eviti ĉion, kio ĝin malbeligas. Same kiel ĉiu vivanta lingvo ankaŭ Esperanto povas esti kripligata per ofta uzado de certaj sonoj.

La belecon de Esp. ne povas pligrandigi la troa uzado de la multenombra finiĝo —j kaj la amasigo de la vortoj kun —aŭ (ĉiuj tiuj, kiuj..., hieraŭ, hodiaŭ aŭ ankaŭ morgaŭ). Tial verkisto aŭ parolanto devas eviti ilian amasigon en la frazo kaj lokumi ilin inter la vortojn kun sonoj aliaj. Gravan rolon en Esp. ludas la elparolado kaj akcentado. La vortojn kaj frazojn oni devas ne nur bone akcenti, sed entute elparoli tiel, ke ili sonu agrable. La sonojn »—j«, »ĉu« kaj »aŭ« oni devas en la lingvo nur skizi, ne elparoli »plenbuŝe«.

Modelan elparoladon de Esp. prezentis dro. Zamenhof. Kiel dolĉe kaj agrable fluis liaj vortoj! Mi estas certa, ke al lia Esp. neniu kontraŭulo povus riproĉi nebelsonecon.

(Daŭrigota.)

ooo

### XIII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

de la 31. julio ĝis la 6. aŭgusto 1921 en Praha — Ĉeĥoslovakujo.

#### VI. Komuniko.

Fakaj kunvenoj: Por filatelistoj — organizas so Fleischer, teosofanoj — so Cimr, ŝakludantoj — so Hájek, kiu aranĝos ankaŭ vetludon de esperantistoj-ŝakistoj.

Kotizajo: Vidu la V. Komunikon!

Deponado de la mono en Praha: Vidu IV. Komunikon!

Vojaĝaferoj: Vidu la IV. Komunikon!

Garantia fundo: 1. so Ĉeĥ el Wien kaj 2. Dro Róbin — Warszawa po 100 Kĉ, 3. so Heek — Hengelo 500 N. G. Garantii precipe gesamideanoj el landoj kun bona valuto!

Donacoj: Ĉeĥoslovaka ministerio por eksterlandaj aferoj — 5000 Kĉ, so Heek el Hengelo — 600 N. G., sino Mammen el Grenaa kaj ŝiaj 10 lernantoj-skoltoj 100 Kĉ, so Straka — Bratislava 100 Kĉ, so Kroužil kun siaj kolegoj kaj studentoj — Brno 60 Kĉ, Anonima societo »Centra Esperanto-librejo — 's Gravenhage — 51 K, so Ribas de Pina — Huesca 5 liroj.

Kongresa kaso: La financa sekcio aranĝis la 6. XII. 1920 amuzvesperon de s. Nikolao kaj du teatrajn prezentadojn: 19. XI. 1920 kaj 26. I. 1921, per kiuj entrepranoj pliriĉigis la kaso je 6000 Kĉ.

Aliĝoj: 102. Fino Bridel el Blois, 103. so Cimr — Praha, 104. so Prengel, 105. sino Derengowska, 106. so Derengowski — Bydgoszcz, 107. so Andersson — Malmö, 108. so Badura — Karvin, 109. so Cech — Wien, 110. so Kárpáti — Košice, 111. so Radó — Budapest, 112. Dro Wicke — Chemnitz Gablenz, 113. so Mascaró — Palma de Mallorca, 114. so Thiébault — Carignan, 115. Dro Róbin — Warszawa, 116. Fino Hollertt — Rotterdam, 117. so Straka — Strašnice, 118. so Kubala, 119. sino Kubalová, 120. Fino Kubalová — Slezská Ostrava, 121. Dro Kamaryt — Bratislava, 122. so Ribas de Pina, 123 sino Mercedes Vives O'Rell — Huesca, 124. Sino Pokorny, 125. Fino Kauschka, 126. Fino Heybal — D. Gabel, 127. so Alessio — Padova, 128. so Sappl — Graz, 129. Dro Theilhaber, 130. sino Theilhaber — München, 131. Grenkamp Kornfeld — Jaslo.

Adreso por nur prikongresaj korespondajoj kaj oficialaj aliĝoj: A. P., Praha III., Nerudova 40. (Por respondo nepre necese aldoni respondkupon aŭ poŝtelspezon en naciaj poŝtmarkoj!)

Aug. Pitlík,  
gener. sekr. de la Deko Kongreso  
Komitato.

### Al Sinjorino Marinjo Nolc en Řičany —

por rememoro de dato 28. XI. 1920.

Sinjorino, plej bona, Sinjorino, plej estimata,  
Vi en monato edziniĝis plej bela kaj plej riĉa.  
Vin edziĝis la homo, kiu ne estas superŝtiĉa,  
Li, legiano estas certe de ĉiu plej amata!  
Vi edziniĝis en monato riĉa, plej fruktodona.  
Dio Vin benu kaj plimultigu la genton plej bonan,  
Genton, Vian gloron kaj de respubliko nia;  
Ĝi estu feliĉa, kompreniĝante unu alian.  
Gentaro la Via, internacia, estu siliko!  
Dio nur benu Vin kaj Vian patron grandfamilian.  
Nia legiano fiero estu de estonteco.

Via plej sincera amiko

Emanuelo Batěk  
ekslernerjestro.

M. JAHN:

### RENDEVUO.

En somera vespero mi trafis junulon en bethula arbareto. Li mordetis en la buŝo ian branĉeton, rigardis malproksimen, sed kiam li ekvidis min, li iris iomete flanken tute ruĝiginta kaj staris denove kaj rigardis. El liaj embarasita vizaĝo kaj vagemaj okuloj mi divenis, ke li atendas rendevuon.

Mi ridetis en animo pro lia timemeco. Kial li timis?

Tial, ĉar li volis kunveni, kun sia knabino al kiu li diros kelkajn spiroplenajn vortojn, kiun li eble prenos je la mano aŭ eĉ kisos sur la vangon?

Mi ridetas pri tiu junulo, mi ridetas pri mi mem kaj pri ni ĉiuj, kiuj en tiuj jaroj estis similaj al li.

Malsaĝaj, frenezaj jaroj diros la skeptikulo.

Kaj tamen tio estis la plej belega kaj plej feliĉega tempo de la vivo!

Tradukis A. Hrdinová.

## DIVERSAĴOJ

**Atentigo!** Finaj vortoj en la linioj de nia gazeto estas multloke erare dividitaj. Tion kaŭzas la kompostito nescianta Esp. Ĉar nia gazeto estas kompostata per maŝino, kiu fondas tutajn liniojn, kaŭzas la korektado sufiĉe gravan laboron. Tial ni lasas la erarojn, esperante, ke la leganto ĝuste komprenos la sencon de la vortoj. La redakcio. •

**Ĉiuj legu!** Orient-bohemaj esperantistoj aranĝos en Přelouč, de la 27a de marto ĝis 4a de aprilo 1921 esperantistan ekspozicion. Ekspozicio enhavos krom diversaj aĵoj gajnitaj per esperanto el ĉiuj partoj de la mondo, eĉ specimenaĵojn fabrikojn de niaj esperantistoj. — Produktistoj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri tio, ke iliaj produktoj estu ekspoziciotaj en nia regiono, aliĝu kaj sendu plej malfrue ĝis la 15a de marto viajn specimenaĵojn produktojn kun anoncita vanda prezo. Ni tre petas niajn samideanojn, ke ili afable pruntu al ni speciale rimarkidajn aĵojn el fremdlando (poŝtmarkoj, moneroj, brodaĵoj, kompletaj aŭ partoj de kostumoj, artistaj miniaturoj aŭ galanteriaĵoj ktp.), kun karto de la priskribo kaj nomo de posedanto boheme-esperante. — La 3a de aprilo okazos la V. Laborkunsido samtempe kun kongreso de ĉiuj partoprenantoj de la VII. Kongreso de O.-B. Esp. el jaro 1914 en Přelouč. La saman tagon vespere: »Amika programa vespereto.« — Profiton oni dediĉos al nia Kongreso. Ĉiujn demandojn plenumos, ankaŭ la sendaĵon por ekspozicio akceptas Karlo F. Ludvík, sekretario de la Rondeto Esper. en Přelouč.

**Ika.** En Brno faris so. Balák paroladon pri Esp. kaj Ika. inter katolikoj. Tie estas fondita oficejo de Ika. Informojn petu laŭ la adreso: Husovice, Komenského nám. 17.

»Epera«, eksporta kaj importa entrepreno estis fondita en Praha-Nusle 494. de nia vigla samideano J. Mikš, kiu per ĝi volas pruvi la utilon de Esp. por la komercaj rondoj. Tiu ĉi entrepreno meritas plenan fidon kaj subtenon, tiom pli, ke ĝia posedanto estas fervora propagandisto de Esp. inter sia kolegaro, kiu ĝis nun ne kredas, ke speciale Esp. estas valora helpilo por ĉeĥoslovaka komercisto, kiu volas kaj devas ekligi rilatojn kun fremdlando. So. Mikš efike laboras por enkonduki Esp. en la komercan akademion de Praha.

**Kongresoj.** XII. Brita esp. Kongreso okazos dum Pentekosto 13—17 majo 1921 en Harrogate. — II. kunveno de esperantistoj el Iberiaj landoj okazos 26—28 majo en Zaragoza. Ĝia celo estos restarigi la Iberian Esp. Federacion. Informojn donas so. d. Maynar, 19, calle Cerdán pral. Zaragoza. — Nordokcidentgermana Esp. Kongreso okazos 4—5 majo 1921 en Harburg ap. Hamburg. Informojn donas so. P. Hübner, Reeseberg 56, Harburg ap. Hamburg. — Universala katolika Kongreso okazos en Graz post la kongreso en Praha 8—12 aŭgusto 1921. Informojn donas Organiza komitato, Graz, Karmeliterpl. 5, Aŭstrio.

**II. Internacia Foiro en Barcelona** okazonta 20—30 aprilo 1921 ankaŭ uzas Esp. por sia propagando. Ni ricevis belan kaj ilustritan informilon pri la foiro kun la tekstoj en tri lingvoj: hispana, esp., kaj franca. Esp. propagandon prizorgas Kataluna Esp. Federacio. Carne 30 pral., Barcelona, ĉe kiu niaj komercistoj kaj interesantoj petu informojn.

**Japanoj ĉe la XIII.** Nia amiko so. Aitaró Jamanoi sciigis nin, ke li kaj lia amiko Ito ĉestos la XIII. La Japana Esp. Asocio estos reprezentanta de so. S. Narita. So. Jamanoi restos en nia lando proksimume unu jaron kaj per sia vizito li celas: 1. ellerni profunde nian nacian lingvon, 2. verki japanan verkon pri nia nacio laŭ ĝia stato nuna kaj mezepoka, kaj 3. paroladi pri Japanio (en diversaj lingvoj). Ni aldonas, ke la Libera Penso ĉeĥoslovaka interesas sin pri so. Jamanoi kaj deziras, ke li paroladu pri la japana religio.

**Instruo por gejunuloj pri la seksa vivo.** Sub tiu ĉi titolo aperis la esp. traduko de la verketo de nia ŝatata samideano Dro. Alex. Baťk. La verketo enhavanta 16 paĝojn 12×16 cm, instrue priparolas la delikatan temon pri la seksa vivo kaj ni povas ĝin rekomendi ne sole al gejunuloj, sed eĉ al maturaj samideanoj. Ĝia tradukintino estas nia fervora samideanino Zdena Kubíková, Praha II. 460, ĉe kiu estas la libreto ricevebla por 3.— Kĉ.

**El familio de Progresanoj.** Amiko Ant. Ráž, instruisto el Beroun kaj fino. Lola Haasová el Liberec (Reichenberg) geedziĝis la 7. februaro 1921. Ni varme gratulas al ambaŭ, dezirante al ili tre feliĉan kunvivan kaj — idaron multan kiel sablo en la maro.

## KRONIKO

### DE ASOCIO.

**Ĝenerala kunveno de Ĉ. A. E.** estis prokrastita al 27 februaro t. j. Ĝi okazas de 1/2 10 matene en la restoracio Šramota («Parlament» sur Václavské nám. 64, kontraŭ la statuo de Sta Václav, I. et.)

**Partopreni** ĝin povas ĉiu embro, kiu pagis sian kotizajon por 1921. La kluboj kaj izoluloj, kiuj ĝis nun ne pagis, bonvolu uzi la poŝtan transpilon, kiu estas aldonita al la invito. La membro, kiu ne povas persone partopreni en Praha, povas sian voĉdonrajton transdoni al alia membro ĉeestonta, transdonante al tiu membro sian legitimacion. Novaj legitimacioj por 1921 ne estas disdonataj, sed al ĉiu repaginto estas sendata speciala glumarko kvitanca algluota sur la dorsan flankon de la legitimacio por 1920. Programo: Protokolo de la fonda ĝenerala kunveno. Raportoj de la Komitatanoj. Baloto de 1/3 da ĉiuj funkciuloj. Debato pri la agado en 1921. Libera proponoj. (Ilin devas ricevi la komitato almenaŭ 3 tagojn antaŭ la ĝenerala kunveno.)

**Pri via alveno** al Praha bonvolu informi ĝen. sekretarion.

**Praha.** Esperantista klubo en Praha okazigis sian ĝeneralan kunvenon la 11. II. 1920 en rest. »u Marešů«, Mariánská ul. Post la prezento de la raportoj, kiuj estis aprobitaj, nova komitato estis elektita jene: Prez.: S-ro Eiselt, Viceprez. S-ro Pitlík, sekr. S-ro Ginz, kas. S-ro Novák, bibliotekisto S-ro Brambora, protokolisto: S-ro Bohutínský, revuisto F-ino Vlčková, arhivisto S-ro Vondruška; vicekomitatanoj: Ges-oj. Kresová, Hájek kaj Demek. Kontrolistoj: Stejskal, Vlach kaj Poustka. Oni diskutis poste pri la proponoj de S-ro Hebký kaj fine starigis du sekciojn: Virinan, kies estro estas S-ino Nováková kaj Amuzan, kiun gvidas F-ino Vlčková. Ĉar nombro de la membroj ĉiam kreskas, oni serĉos pli grandan kaj pli taŭgan ejon. Ĉiuj membroj hel-

pos en laboroj kongresaj kaj estas pretaj agribligi a la kongresanoj la tagojn en Praha pasigitajn kiel eble plej multe..

**Hradec Králové.** La ĝenerala kunveno de E. Klubo okazis la 19. I. Nova komitato estis elektita jene: Prez. MUDro Albert Fišá, kuracisto-kapitano, viceprez. Karel Juna, fervoja revidento, sekr. Otto Sklenčka, bankoficisto, kas. F-ino Em. Macháčková, bibliotekisto kaj revuisto S-ro Jan Jelínek, protokolistoj: Em. R. Jelínek, plue F-ino M. Dolanská kaj S-ro Arnošt Fantl. Post la 15. t. m. komencos novaj kursoj: elementa kaj konversacia.

**Brno.** S-ro instruisto Šembera fininte kurson en dec. (15 p.) malfernis novan en januaro. So prof. Kroužil instruas en la industria lernejo (nedevisa lernobjekto) kaj en la knabina burĝa lernejo. En la blindula instituto instruas S-ro Krchňák. Alian kurson por fervojistoj gvidas S-ro sekr. Barviř. En la germana kom. akademio instr. prof. Baudys.

**Břeclava.** Kurson por fervojistoj gvidas S-ro sekr. Barviř.

**Řetkovice.** (Moravio.) S-ro instruisto Stoklásek instruas E. en la burĝa lernejo.

**Bratislava.** S-ro Wanišček gvidis du publikajn kursojn: unuan en Primas-palaco kaj la ŝtata reala lernejo. La sama instruas E. kiel nedevigan objekton en knaba burĝa lernejo.

**Horáždovice.** S-ro Duchoň aranĝis kurson de E. en publika leĝejo, en kiu instruas S-ro Novák (17 p.)

**Studentoj.** Laŭ la peto ricevita de pluraj studentoj estos ĉe la Asocio fondita Studenta sekcio. La kolegoj, kiuj havas intereson pri tio, skribu al la sekretario de Ĉ. A. E.

**Glumarkoj** propagandaj kaj kovertoj kun propaganda teksto estas riceveblaj ĉe la Asocio. Cent glumarkoj (12 diversaj specoj (5 K afr., cent kovertoj 15 K afr. Uzadu ilin!

## BIBLIOGRAFIO

(Recenzisto Dro Silaba.)

Tre ĝojiga fakto por nia movado estas, ke nia literaturo en la lasta tempo rimarkinde disvolviĝas, kio pruvas ankaŭ la vastiĝon de la tuta movado. Al la plinombriĝo de esperantaj verkoj helpas ne nur tradukoj, sed eĉ kelkaj verkoj originalaj, kiuj ĉefe meritas la subtenon de niaj samideanoj. El vico da verkoj, kiuj nia redakcio ricevis, estas ĉefe citinda: Vivo de Zamenhof, libro broŝurita, 204 paĝoj, 19×14 cm, kun multaj ilustraĵoj, prezo 3 ŝilingoj (48 Kĉ.), ricevebla ĉe administracio de »La Progreso«. Ĝi aperis kiel I. volumo de la »Libraro Bolingbroke Mudie« ĉe Brita Esp. Asocio kaj ĝia aŭtoro estas nia eminenta kolego Dr. Edm. Privat. La enhavo okupas sin per la tuta familio de Zamenhof, kies sortojn ĝi priskribas tre kortuŝe, eĉ kun historio de nia lingvo. Ne estas dubo, tiu ĉi libro fariĝos biblio de ĉiu esperantisto kaj oni devas ĝin ĉiam kaj ĉie plej varme rekomendi. — Alia rimarkinda verko originalan prezentas sin al la esperantistaro en la broŝuro de nia fama kolego Ivan Krestanov: »El la proksima oriento«. Paĝoj 68, 21×14 cm, aperis en la »Bulgara esp. biblioteko«. Al la verko estas aldonita etnografia karto de malnova Rusio. Per klara kaj

facile komprenebla stilo estas tie ĉi priskribitaj pli gravaj, sed tamen ne sufiĉe konataj nacioj de iama rusio imperio kaj iliaj landoj: Ukrainio, Litovio, Blankkrutenio, Letonio, Estonio, Finnlando, Georgio kaj la Tataroj. Ĉiu, kiu volas sin nomi inteligento devas koni tiujn landojn kaj tiean vivon, kaj jen oni havas plej konvenan okazon por sin instrui en tiu direkto. — Ankaŭ tiu ĉi libro estas ricevebla ĉe la administracio de La Progreso. — Prezo 15.— Kĉ. (Daŭrigota.)

oooo

## DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresio kostas 2 Kĉ.)

**Dolní Krupá u Nĕm. Brodu** (Ĉeĥoslovakio). So. Mil. Skořepa, instr. — koresp. ankaŭ france, germ., hisp., portugale, itale, p. i. Resp. ĉiam.

**Nový Bydžov** (Ĉeĥoslovakio). Gimnasis. A. Urban. deziras korespondadi per k., l. precipe kun skoltaj kaj japanoj. Interŝanĝas monerojn, monpaperojn kaj mineralojn.

**Hořice** (Ĉeĥosl.). II. obch. ŝkola — Fino Marie Havelková, interŝ. p. k. kaj let. Ĉiam resp.

**Zumberk ap. Chrudim** (Ĉeĥosl.). So. Jaro Zajíček, interŝ. p. k. kaj let. Koresp. esper., boHEME, angle, kaj france.

**Břevnov** (Ĉeĥosl.), Marketská ul. 72. — So. Adolf Dlabáček interŝ. p. k. kaj let. Deziras ludi ŝakon laŭ angla aŭ bohema notsistemo. Ĉiam resp.

**Mekovice**, p. Kralupy n. Vlt. (Ĉeĥosl.). — So. Stáňa Vlach, studento, koresp. kun gestudentoj.

**Klatovy** (Ĉeĥosl.) Semín. 56. — So. Karel Maléc, studento, interŝ. p. k. kaj let.

**Slaný** (Ĉeĥosl.), Benešova tř. 179. — So. Alois Zíma, interŝanĝas p. k., p. m. kaj fotografajojn.

**Pardubice** (Ĉeĥosl.). So. Em. Vagner u p. J. Prachenského, zál. nemocnice — interŝanĝas p. k. kaj p. m.

**Hořice** (Ĉeĥosl.) I. roĉ. obch. akademie. — So. Přemysl Huml, interŝ. p. k. kaj let. Ĉiam resp.

**Hořice** (Ĉeĥosl.) I. roĉ. obch. akademie. — So. Jos. Vágnér, interŝ. p. k. kaj let. Resp. ĉiam.

**Hořice** (Ĉeĥosl.) Státní prům. ŝkola. — So. Vít Vrátný, interŝ. p. k. kaj let. Resp. ĉiam.

**Kralupy n. Vlt.** (Ĉeĥosl.), Žižkova ul. 81. — So. Josef Krumpholz dez. koresp. per p. k., let., kaj interŝ. p. m.

**Jilemnice** (Ĉeĥosl.). So. L. Riedl koresp. per p. k. kaj interŝ. gazetojn, papermonon kaj fotografajojn. Ĉiam respondos.

**Stodo** 136 u Plzně (Ĉeĥoslovakio). So. Rud. Šindelář, dez. koresp. per il. p. k. kaj interŝ. p. m.

**Nýřany apud Plzeň** Nro. 143 (Ĉeĥoslov.) Sro. J. Dolanský deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj per P. K., ŝanĝas P. M., esp. gaz.

Dopisnice s obrazem presidenta

**T. G. MASARYKA**

vydala admin. „La Progreso“

kus 30 hal., 10 kusů 2-70 Kĉ, 100 kusů 24— Kĉ.

Samideanoj el landoj de centra kaj orienta Eŭropo povas aboni

## „Hispana Esperantisto“

ĉe so. F. Šilha, Praha II., 460 u Karlova.

La gazeto estas ilustrata, 16 paĝa, kun riĉa kaj interesa enhavo ankaŭ pri Ĉeĥoslovakio. Jara abono 45— Kĉ.

## Knihy, jež možno obdržeti v naší administraci.

(Při objednávce poštou nutno připočísti poštovné, jiných knih nevedeme.)

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný . . . . . Kĉ 7.50  
Slovník esperantsko-český, brož. . . . . Kĉ 5.—  
Časopis »La Progreso«, roč. 1918 . . . . . Kĉ 4.50  
Časopis »La Progreso«, roč. 1919 . . . . . Kĉ 6.—  
Tittl: Krátká mluvnice Esp. . . . . Kĉ 0.30  
Čejka: Slovník esp.-čespy, brož. . . . . Kĉ 7.80  
Čejka: Slovník čes.-esperantský . . . . . Kĉ 3.30  
Čejka-Krumpholz: Podrobná mluvnice Esperanta . . . . . Kĉ 7.30  
Čejka-Krumpholz: Malá mluvnice Esperanta . . . . . Kĉ 3.10  
Esp. movado en Moravio . . . . . Kĉ 4.—  
Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár. . . . . Kĉ 0.80  
Jazyk všeslovanský a Esp. . . . . Kĉ 0.20  
Kühnl: Úplná učebnice esperanta: c) vazba v plátěném hřbetě . . . . . Kĉ 14.40  
Kühnl-Procházká: Slovník česko-esper.: b) brožovaný . . . . . Kĉ 18.—  
Vorloj de Zamenhof, na lepším papíře . . . . . Kĉ 6.—  
Sherlock Holmes . . . . . Kĉ 4.50  
J. S. Machar: Benedek . . . . . Kĉ 3.60  
Gvidlibro tra Praha . . . . . Kĉ 3.60  
Výtah z Kotzina: Na obranu esper. . . . . Kĉ 2.40  
Co je esperanto . . . . . Kĉ —.20  
Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo . . . . . Kĉ 20.—  
El proksima oriento . . . . . Kĉ 15.—  
E. Privat: Vivo de Zamenhof . . . . . Kĉ 48.—

Via horloĝo funkcios precize se vi ĝin donos por rebonigi al

**FR. NOVÁK,**  
horloĝisto en Praha I.  
Malé nám. 10.



Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj, kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kĉ 4.—, afrankite Kĉ 5.—, 1000 pec. Kĉ 35.—, afrankite Kĉ 37.50.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.